

Heinrich Heine,  
 Libro de la kantoj, Lirika intermezo, VI

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Alpremu la vangon al mia vang',  
 Ke niaj larmoj kuniĝu,  
 Kaj vian koron al mia kor',  
 Ke l' flamoj unuiĝu.<sup>2</sup>

Se en la flamon enverŝas sin  
 De niaj larmoj fluo  
 Kaj se mi tre firme brakumas vin,  
 Mi mortos pro am-ĝuo.

*Traduko de la Germana poemo "Buch der Lieder, Lyrisches Intermezzo, VI" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1984-02-24.*

MR-145-1 / Arg-716-1439 (2012-12-09 14:29:05)

---

<sup>2</sup>aŭ:

Alpremu la vangon al mia vang',  
 Ke niaj larmoj kunfluu  
 Kaj vian koron al mia kor',  
 Ke niaj flamoj unuu.